

Unesko diras: nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn

Renato Corsetti

La ĉi-jara mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al la Universala Kongreso estas aparte varma kaj aparte enhavo-plena. Ĉiu leganto juĝu mem el la ĉi-suba teksto. Ĝi rekonas la komunecon de celoj kaj valoroj inter la Esperanto-movado kaj Unesko mem. Temas pri teksto bone utiligebla en nia informa laboro. Tiucele oni komencis produkti nacilingvajn versiojn, kiujn vi povas trovi en la reta paĝo http://www.linguistic-rights.org/unesco/unesco.html#UNESCO_103aUK, prizorgata de la reprezentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo, Stefano Keller, kun kiu vi interkonsentu pri pliaj tradukoj, skribante al traduko@linguistic-rights.org. La saluto estis petita per taŭga letero en majo de Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI, kiu ankaŭ pri-zorgis la tradukon al Esperanto de la franclingva originalo. Gratulojn al ni ĉiuj pro la rekono kaj bonan pluan laboron!

Mesaĝo de s-ino Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de Unesko, okaze de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto, Lisbono, la 29-an de julio 2018

Mi estas feliĉa povi sendi ĉi tiujn subtenajn vortojn al la partoprenantoj de la 103-a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio.

Vi havas la ŝancon kunveni en tiu belega urbo Lisbono, urbo ligita al vasta historio, kiu konstruiĝis en vojkruciĝo kun diversaj kulturoj, urbo malfermita al la mondo, tutokcidente en la Iberia duoninsulo.

Mi ne dubas, ke tiu elstara kadro sukcesos inspiri al vi fruktodonajn interŝanĝojn.

Kiel vi scias, Unesko subtenas la instruadon de Esperanto ekde multaj jaroj.

Estas fakto, ke nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.

La cemento de ĉiuj tiuj valoroj estas la kapablo dialogi, aŭskulti, interkomunikigi.

La lingvoj, kiuj estas la vektoro ebliganta tiun dialogon, konsistigas do la esencan ilon por atingi la celojn, kiujn

ni devas realigi, kaj same por la defendo de niaj valoroj.

Ni devas defendi la lingvojn, ĉefe la maloftajn lingvojn, la indiĝenajn lingvojn, pri kiuj ni scias, ke ili malaperas nuntempe laŭ la ritmo de po unu ĉiujn du semajnojn – kio estas neriparebla perdo por la homa heredaĵo. Ni devas defendi ankaŭ la plurlingvismon en la instruado, per adekvataj publikaj politikoj, sed ankaŭ en la virtuala spaco de la interreto, por ke plu vivu la lingva kaj kultura diverseco de ĉiuj homgrupoj; por ke ĉiu povu lerni pri sia historio, sia identeco, ĉerpante el la simbolaj fontoj de sia origina etno.

Tiu sin-engaĝo estas ankaŭ la via.

Ĉar Esperanto ne volas forviŝi la grandan kvanton da parolataj lingvoj en la mondo; male, ĝi reprezentas taŭgan ilon por komuniki en respekto de ĉiuj lingvoj, ĉu de la plimulto, kaj realigas la ekziston de homgrupo de parolantoj, sendependaj de iu ekonomia, politika aŭ kultura hegemonio.

Paroli Esperanton estas sin levi al kosmopolita konscinivelo, esti mondci-

vitano – sen forlasi siajn apartajn ligojn.

La temo elektita por via kongreso en tiu ĉi jaro estas: “Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?”

La elektenda direkto certe estas tiu, kiun via Movado kaj nia Organizo montras de multaj jaroj: engaĝiĝi pli kaj pli por savi kaj vivteni tiun esencan parton de la nemateria homara heredaĵo: la lingvojn; defendi la lingvan diversecon kaj kuraĝigi al plurlingva edukado.

Tiel ni sukcesos konstrui mondon pli malfermitan, pli inkluzivan kaj pacan.

“Multaj voĉoj, unu mondo” – jen la slogano de nia fame konata organo *Unesko-Kuriero*.

“Multaj voĉoj, unu mondo”, tiel tradukiĝas al Esperanto tiu idealo, kiun vi kaj ni havas – kaj kiu estas skribita sur la versio de nia revuo, aperanta ekde nelonge en Esperanto: *Unesko-Kuriero*.

Finfine mi volas esprimi, nome de Unesko, elkorajn bondezirojn por la sukceso de via Kongreso.

Audrey Azoulay,
Ĝenerala Direktoro de Unesko

Kiel vi scias, Unesko subtenas la instruadon de Esperanto ekde multaj jaroj

Ako viete, UNESCO podporuje vyučovanie esperanta už mnoho rokov

Zoals u weet, ondersteunt UNESCO het onderwijs in Esperanto al vele jaren

Som ni vet har UNESCO stött undervisning i esperanto under åtskilliga år

正如你所知，联合国教科文组织支持世界语教育好多年了

As you know, UNESCO has supported the teaching of Esperanto for many years

Как вы знаете, ЮНЕСКО поддерживает обучение эсперанто в течение многих лет

Comme vous le savez, l'UNESCO soutient l'enseignement de l'espéranto depuis de nombreuses années

Como sabem, a UNESCO apoia o ensino do Esperanto há vários anos

Bildigini gibi Unesco uzun yillardan beri Esperanto eĝitimini desteklemektedir